

Basyoo

Leteretoj en dorsosako

Estas io en la korpo kun cent ostoj kaj naŭ orificoj. Oni nomas provizore ĝin Huarabou [venta vagabondo], kio verŝajne signifas iun tre maldikan, facile rompiĝeblan per vento. Li delonge ŝatas frenezan poemon. Kaj fine tio fariĝis lia profesio en la tuta vivo. Unufoje enuigante li voladus forlasi tion, aliffoje li aktive fieradis pri vanta venko kontraŭ rivaloj kaj en koro nepre konkuradis, tial do al li estis maltrankvile pro tio. Li volus iam enoficiĝi, sed amo al poemo malhelpis lin. Kvankam li intencis dume lerni budhismon por iluminigi sian malsaĝecon, tamen ĉi tiun intencon disrompis ankaŭ poemo. Finfine, sen talento, sen arto, li alligis sin nur al unu ĉi tiu vojo.

Japana poezio de Saigyoo, ĉena poezio Renga de Sougi, pentraĵo de Sessyuu, teceremonio de Rikyuu, ĉio ĉi estas trapenetrita per unuaĵo. Entute, kio estas estetiko, tio obeas al la Kreanto de universo kaj amikiĝas kun kvar tempoj. Kien ajn oni vidas, ĉie troviĝas floroj. Kion ajn oni pensas, ĉio fariĝas luno. Se al kiu la bildo ne ŝajnas floro, tiu egalas sovaĝulon. Se al kiu la koro ne ŝajnas floro, tiu apartenas al specoj de birdoj kaj bestoj. Necesas liberigi sin de sovaĝeco kaj de besteco, kaj obei al la Kreanto de universo kaj reveni al la Kreanto.

En la komenco de deka monato [sendia monato], ĉielo ŝajnas malcerta, mi mem sentas min kiel folio, portata sencele per vento.

“Vojaĝanto” estas

Mia nomo,

Unua vintra pluvo

Basyoo

[Tabi bito to waga na yobaren hatu sigure]

Denove kamelio-sazanka

Fariĝos loĝejoj

Tyootaroo

[Mata sazanka wo yado yado ni site]

S-ro Tyootaroo, loĝanto en la urbo Iwaki, almetis ĉi tiun duan strofon, kai en la domo

de s-ro Kikaku oni regalis min per adiaŭa bankedo.

Nun estas vintro,
Sed de Yosino vi nepre reportos
Printempan rememoron

Rosen

[Toki wa huyu Yosino wo komen tabi no tuto]

Ĉi poemon donis al mi lordo Rosen. Kun ĝi komencis donacoj ĉe adiaŭo de malnovaj amikoj, proksimaj kaj malproksimaj, disĉiploj, k. a., aŭ per poemaro, versita de ili, aŭ per monoj por pajlsandaloj, kun kiuj ili esprimis sian senton. Laŭ Zhuan-zi, ĉina filozofo, “necesas kolekti provizon por tri monatoj, se vojiri mil leŭgojn”, sed al mi estas tre facile kolekti ĝin. Veston el papero kaj mantelon vatitan, ĉapelon kaj ŝtrumpojn, ĉiu homo kune donis al mi laŭ sia volo, tial do mi tute ne timas froston dum prujno kaj neĝo. Unu organizis bankedon en sia vilao kun ekskurso per boato, alia por gratuli vojaĝon vizitis min al la herba ermitejo, portante vinon kaj bongustan mangĉaĵon, tiel do oni bedaŭris adiaŭon. Tio similas al la ekvojaĝo de almoŝtulo, kaj ŝajnas al mi tro pompega.

Koncerne al taglibro de vojo, de kiam tre verve verkis ĝin eminentaj verkistoj kiel Ki, Tyomei kaj la bikŝuino Abutu, la posteuloj nur imitadis ilin, ne estante malpli similaj unuj al aliaj, kaj ne povis superi ilian feĉon. Des pli por mi, per senkompetenta plumo kaj per supraĵa scikono, tute ne eblas bone skribi ĝin. Kiu ajn povas skribi, ekzemple, “Kvankam pluvis hodiaŭ, tamen posttagmeze sereniĝis, ĉi tie estas pinarbo, kaj tie fluas iu rivero, k.t.p.” Tamen tiaspecan banalaĵon oni ne devas skribi, se tie ne troviĝas io kurioza de Huan Shanku kaj io nova de Su Dongpo. Sed mi skribas pri tieaj pejzaĝoj, restintaj en mia koro, pri malfacilaĵo kaj tristeco en montaj aŭ kamparaj loĝejoj, pensante, ke eĉ tiuj fariĝu temoj de konversacio aŭ ia speco de leteroj laŭ vento kaj nubo, tiel do mi sen ordo de tempo kolektadis ion ne forgeseblan. Bonvolu aŭskulti malserioze, konsiderante ĉion egala al freneza parolado de ebriulo aŭ al deliraĵo de dormanto.

Restante en Narumi,

Ke mallumon ĉe Stela Kabo
Rigardu,
Krias kvazaŭ tiele karadrioj

[Hosizaki no yami wo miyo toya naku tidori]

Oni diras, ke s-ro Asukai Masaaki, la kortegano, iam loĝis en ĉi gastejo kaj versis:

“Malproksime de ĉefurbo Kioto
Trovegas laguno Narumi,
Apartiginta vastan maron”.

[Miyako mo tooku Narumi gata harukeki umi wo naka ni hedatete]

Lia moŝto mem skribis ĉi tiun version kaj donis al la gastejo. Aŭdinte tion, mi ankaŭ versis sekvan hajkon.

Ĝis Kioto ankoraŭ duono de vojo,
Kaj duonĉielo estas kovrita
De neĝa nuboj

[Kyoo made wa mada nakazora ya yuki no kumo]

En la provinco Mikawa, ĉe la loko, nomata Hobi, kaŝite loĝas ekzilita Tokoku. Mi volis vidi lin kaj unue mi skribis leteron al s-ro Etuzin. Returninte malantaŭen el Narumi je 25 leŭgoj por renkontiĝi kun Etuzin, ĉi tiu nokte mi loĝis en Yosida.

Estas malvarme,
Tamen duope dormis ĉi nokte
Ni kun fidinda amikeco

[Samu keredo hutari neru yo zo tanomosiki]

Amatunawate estas la loko, kie kuras laŭlonge streta vojeto tra la rizkampo, tie alblovas el maro tre malvarma vento.

Vintra suno,
Sur ĉevalo sidas
Frostiĝanta ombrulo

[Huyu no hi ya bazyoo ni kooru kagebousi]

De la vilaĝo Hobi ĝis la kabo Irago estas distanco ĉirkaŭ unu leŭgo. Kvankam la promontoro rekte kontinuas kun la provinco Mikawa kaj do estas apartigita de la provinco Ise per maro, tamen, ne scias kial, en la Manjoo oni elektis ĝin kiel unu el vidindejoj de Ise. Mi trovis ĉi tie sur la sablobenka ŝtonojn por Go-ludo, kiujn oni nomas

ilin Iragoziro [blanko de Irago]. La Osta monteto, nomata Hone-yama, estas la loko, kie oni kaptas falkojn. Ĝi situas sur la suda landekstreĉo ĉe marbordo, tial do, onidire, falkoj pli frue alflugas. Malnovaj poezioj jam kantis pri la falko en Irago, despli multiĝas ĉe mi intereso. Ĝuste, kiam mi pensis tion,

Unu falkon vidante,
Mi ekĝojas
Sur la Kabo Irago
[Taka hitotu mitukete uresi Iragozaki]

Restaŭro de la sanktejo Atuta

Repolurita
Spegulo estas pura,
Floroj de neĝo
[Togi naosu kagami mo kiyosi yuki no hana]

Oni min renkontis en Nagoya, maldekstre de la sanktejo, mi ripozis tie dume kaj versis.

Neĝas ĉi matene,
Iuj, verŝajne, estas nun pasantaj
La Barrieron de Hakone

Kunsido ĉe iu homo

Malĉifinte paperan robon,
Mi solene
Spektas neĝon
[Tametukete yukimi ni makaru kamiko kana]

Nu, mi iru
Spekti neĝon
Ĝis fine mi falos teren
[Iza yukamu yukimi ni korobu tokoro made]

Hajkista kunsido ĉe iu homo

Serĉante bonodoron,
Mi trafis mumeflorojn
Sub alero de staplo

[Ka wo saguru ume ni kura miru nokiba kana]

Interalie, alvenis vidi min el lokoj de la provinco Mino, t. e. Oogaki, Gihu, iuj elegantuloj-poetoj kaj ĉe ni kelkfoje okazadis kunsidoj de rengao [versa ĉeno el 36 versoj], aŭ duonrengao [18 versoj].

Post la deka tago de dek dua monato mi eliris el Nagoya kaj turnis min al la naskiĝloko.

En la mondo iras
Grandskala purigo ĉe la jarfino,
Flanke vidante, mi vojiras

[Tabine site misi ya ukiyo no susu harai]

De la urbo Hinaga, pri kiu versis Saigyoo “El Kuwana mi venis, manĝinte nenion”, mi luis ĉevalon kaj, suprenirante laŭ la deklivo, nomata “bastonbezona”, mi falis teren de sur ĉevalo pro tio, ke selsako renversiĝis.

Se piedirus ĉi deklivon,
Oni apogus sin al bastono,
Mi defalis de ĉevalo.

[Kati naraba tue tuki saka wo rakuba kana]

Estante tre domaĝe, mi ekdiris ĉi verson, sed en ĝi finfine mankas sezonvorto.

Ho, mia naskiĝloko!
Vidante mian umbilikan ŝnuron,
Ploras. Nun finas la jaro.

[Hurusato ya hozono ni naku tosi no kure]

En la jarfina nokto, kun sopiro adiaŭante senlunan ĉielon, mi sendorme trinkadis, tiel do mi enlitiĝis malfrue kaj, trodormante, ne sukcesis vidi unuan sunon de novjaro.

En la dua tago
Mi nepre ne preterlasos
Floran printempon
[Hutuka nimo nukari wa sezi na hana no haru]

Novjara printempo [la kvara tago de unua monato]

Post la kmenco de novjara printempo
Pasis nur naŭ tagoj,
Kaj ĉi tiuj kampoj kaj montoj!
[Haru tatite mada kokonoka no noyama kana]

Sur velkinta gazono
Iomete aeroflagreto
Trembrilas alte je unu-du coloj
[Kare siba ya yaya kagerou no iti ni sun]

En la vilaĝo Awa de provinco Iga restas ruino, rilata al la sankta bonzo Syunzyou [1121-1206]. Ĝi estis nomata Gohouzan Sin Daibutu-zi [Nova templo de granda Budhao de Monto Gohou]. Kvankam nur la nomo restas dum longa tempo kiel memoro, tamen grandaj temploj jam ruiniĝis kaj restis nur la bazŝtonoj, kaj loĝejoj malaperis sub farmkampoj. La sankta budha statuo alta je 5 metroj enteriĝis sub verda muskokovrita tero, tiel do nun reale videblas nur la subluma kapo. Interalie ankoraŭ nun tute staras la plena statuo de la sankta bonzo. Postsigno de la ora epoko estas tiel sendube klara, ke ĉe mi larmoj ekfluis. La lotusa piedestalo el ŝtono kaj la leona seĝo elstaras sur artemizioj kaj galioj. Imageblas eĉ signo de velkintaj ĝemelaj saluoj. Ĉio elvokas al mi estintan gloron vive antaŭ miaj okuloj.

Budha statuo je dek ses futoj...,
Sur la ŝtona piedestalo
Ŝvebas alte aeroflagreto

[Zyou roku ni kagerou takasi isi no ue]

Diversajn aferojn
Elvokas al mi en memoro
La ĉerizfloroj

[Samazama no koto omoi dasu sakura kana]

En Yamada de provinco Ise

{Postsekvante larmojn de Saigyoo kaj sopirante je pieco de la sanktbonzo Zouga}

Ne scias,
De kiu arbo estas la floro,
Sed kia bonodoro!

[Nanno ki no hana towa sirazu nioi kana]

{Saigyoo ĉi tie versis: „Ne scias kial, tamen larmoj ekfluas pro danko”.

Nudiĝo ? - ankoraŭ ne,
Nun en la dua monato
Blovas frosta ventego

[Hadaka niwa mada kisaragi no arasi kana]

{Sanktbonzo Zouga, adorvizitante la sanktejon Ise, fordonis siajn vestojn al almozuloj por forĵeti proprajon.}

Ĉe Bodai templo

{tiam duondetruita}

Rakontu pri tragiko
De ĉi templo,
Hej, fosanto dioskoreon

[Kono yama no kanasisa tugeyo tokorobori]

Al ŝintoisto japanologo Ryuu Syousya

Kiel oni nomas ĝin ĉi tie?
Mi demandis antaŭ ĉio pri la nomo

De kano kun junaj folioj
[Mono no na wo mazu tou asi no wakaba kana]

Renkontiĝis kun s-ro Aziro Minbu Setudou

Sur la prunarbo
Plue branĉo greftita,
Tie ankaŭ prunfloroj
[Ume no ki ni nao yadorigi ya ume no hana]

Hajkista kunsido en unu ĥato

Kolokasio sube en plantejo,
Kaj sur la pordo
Junaj folioj de galio
[Imo uete kado wa mugura no wakaba kana]

Ene de sankta teritorio ne troviĝas eĉ unu arbo de pruno. Kial? Mi demandis al ŝintoistoj. Ili respondis, ke nenial, kaj diris, ke de antaŭe ekzistas neniu prunarbo krom unu, kiu kreskas malantaŭ la knabina domo.

Ĉe virgulinknabinoj
Floras elegante
De unu prunarbo
[Okorago no hitomoto yukasi ume no hana]

En la dia teritorio
Nirvana bildo de Budhao
Ekstersupoza
[Kmigaki ya omoimo kakezu nehanzou]

Post la mezo de tria monato, kiam min al vojiro ektentas la floroj en mia spontane ĝojplena koro, mi volas iri al Yosino por vidi ĉerizflorojn. Min renkontis en Ise tiu, al kiu eĉ la kabo Irago mi jam ĵuris kunvojaĝon. Li kune deziras kunhavi etoson de vagabondeco, fariĝinte paĝio por mi, helpi al mi vojiradon kaj nomigis sin per alinomo

Mangikumarū [dek-mil-krizantemido]. Estas tre interese, ke la nomo vere ŝajnas infansimila. Jen, petolante okaze de ekiro, ni skribis ene de ĉapelegoj:

“Kuniranta paro, senloĝeja, nek en la ĉielo nek sur la tero”.

Kameciparida ĉapelego,

Mi montros al ci

Ĉerizon en Yosino

[Yosino nite sakura misyou zo hinokigasa]

Kameciparida ĉapelego,

Mi ankaŭ vidigos cin

En Yosino

(Mangikumarū)

[Yosino nite ware mo misyou zo hinokigasa]

Multe da vojaĝiloj malhelpas sur la vojo, do mi penis forĵeti preskaŭ ĉion, sed almenaŭ por nokta vestaĵo mi devas porti unu paperveston kaj veston, similan al pluvomantelo, kaj por skribado – tuĉstonon, tuĉpenikon kaj paperon, kaj ankaŭ medikamentojn kaj mangaĵojn. Ĉion enpakinte, mi ŝargiĝas surdorse, tamen miaj kruroj ege ŝanceliĝas kaj mia febla korpo ŝajnas tirata malantaŭen, vojiras tre malrapide, do tiel min premas multe da langvoro.

Laciĝinte,

M luas loĝejon,

Tiam ŝvebas visteria grapolo

[Kutabirete yado karu koro ya huzi no hana]

Ĉe la templo Hatuse

Printempa nokto,

En la angulo de halo

Impone sidas preĝanto

[Haru no yo ya komorido yukasi dou no sumi]

Videblas bonzoj

Kun altaj lignoŝuoj,

Pluvas sur ĉerizfloroj.

[Asida haku sou mo mietari hana no ame]

Mangiku

Apud la monto Kazuraki-yama

Des pli mi volus vidi

La hidan vizaĝon de dio

Ĉi tie dum aŭroro sub floroj

[Nao mitasi hana ni ake yuku kami no kao]

{Oni diras, ke ĉi tie nur nokte agadas la dio, havanta tro malbelan vizaĝon.}

La monto Miwa, La pinto Tahu, La montokolo Hoso, Pado de Tahu al akvofalo Ryuumon[pordo de drako]

Ĉe la montokolo,

Ni ripozas pli alte en ĉielo

Ol alaŭdoj.

[Hibari yori sora ni yasurau touge kana]

Ryuumon

{Imagante pri ĉina poeto Li Bai, kiu amis akvofalon kaj drinkadon}

Florojn ĉe la pordo de drako

Mi donus al la drinkemulo

Kiel bona memoraĵo.

[Ryuumon no hana ya jougo no tuto ni sen]

Al la drinkemulo

Mi volus rakonti pri tia beleco

De floroj ĉe la akvofalo.

[Sake nomi ni kataran kakaru taki no hana]

Nizikou

Petaloj de kerio

Estas flirte falantaj,
Je la bruo de akvofalo.
[Horohoro to yamabuki tiru ka taki no oto]

Akvofalo Seimei [alinome akvofalo de bela fadeno, estas okcidente de la monto Yosino.]

Akvofalo Huru troviĝas en la interno de monto malproksime de la sanktejo Huru je du kaj duono kilometroj. Akvofalo Nunobiki estas laŭ supra fluo de Ikuta en la provinco Tu. Akvofalo Minoo trovas sin ĉe la vojo, trairanta al la Templo Katio.

Ĉerizfloroj

Nur por aprezo de ĉerizfloroj,
Ege admirinde estas piediradi
Ĉiutage je 20 kaj 24 kilometroj.
[Sakura gari kidoku ya hibi ni go ri roku ri]

Suno brilas tutan tagon
Ĝis krepusko sur ĉerizfloroj,
Arboj de tujo malgajas.
[Hi wa hana ni kurete sabisi ya asunarou]

Per ventumilo mi imitas
Trinki vinon sub ĉerizo,
Sur ombron falas petaloj.
[Ougi nite sake kumu kage ya tiru sakura]

Pura akvo el muskokovrita roko

Jen pura akvo,
Sub arbojn penetrinta
Printempa pluvo.
[Harusame no kositani tutau simizu kana]

Dum tri tagoj ni restis en ĉerizfloroj de Yosino, admiris pejzaĝon de matena aŭroro kaj vespera krepusko, estis plene kortuŝitaj per trista luno en heliĝanta ĉielo. Aŭ, ravite per

poemo de Huziwara Yositone la regento pri ĉerizo en Yosino, sorĉite per poemo de Saigyoo pri la pado el rompitaĵ branĉoj, batite per hajko de Teisitu kun krio “ĉi tiu, ĉi tiu!”, mi havis nenion diri kaj nur vane fermis buŝon. Tio estas tre domaĝa. Tiu poezio, kiun mi ekvolis versi, kvankam ŝajnas impona, tamen ne bontona ĉi-okaze.

La Monto Kouya

Krioj de fazano,
Mi sopiras senĉese
Gepatrojn

[Titi haha no sikirini koisi kizi no koe]

Falantaj petaloj
Apud la sankta interna halo,
Mi hontas pro laika ornamo de haro.

[Tiru hana ni tabusa hazukasi oku no in]

Mangiku

Waka

Forirantan printempon
Oni atingis finfine
Ĉe la golfo Waka.

[Yuku haru ni Waka no ura nite oituki tari]

La Templo Kimiidera

Suferante de vundita kalkano samkiel Saigyoo, mi prezentas al mi ankaŭ lin, vergatan sur pramo trans la rivero Tenryuu. Kiam mi luas ĉevalon, al mi en koro aperas la bonzo en la verko “Turezuregusa”, kiu, kun ĉevalo falinte en fosaĵon, koleregis kaj poste pentis. Mi vidas meriton-lertecon de la Kreinto en bela pejzaĝo de montoj, kampoj kaj marbordoĵoj, sekvas postsignon de la liberiĝintaj saĝuloj kaj serĉas verecon de la irantoj laŭ la vojo de estetiko. Mi mem forlasis domon kaj ne havas avidecon je posedaĵoj. Kun nudaj manoj mi havas nenian ĉagrenon survoje. Preferas lantan piediron al palankeno kaj simpla malfrua manĝaĵo estas pli bongusta ol viandaĵo.

Neregula estas itinero por restadi kaj nedefinita estas la tempo por ekiradi matene. Mi deziras nur du en ĉiu tago. Deca gastejo por tranokto, pajlsandaloj konformaj al miaj piedoj - jen miaj modestaj deziroj. De tempo al tempo mi ŝanĝas humoron, ĉiutage refreŝiĝas sento. Se mi renkontas iun ajn bontonan estetikulon, eĉ se etan, tiam senlima estas mia ĝojo. Kiu kutime ŝainas malfreŝa malmolkapa obstinulo, kiun, malamante, oni evitas, eĉ tiu en survoja kabanaĉo kun galio montriĝas kiel interparolinda kunvojaĝanto, tiam do mi sentas, kvazaŭ ektrovis gemon en fatraso aŭ oron en ŝlimo, mi mem notas renkontiĝon kaj volas rakonti al la aliaj. Tio ankaŭ estas unu el vojaĝa ĝuo.

La tago de vestoŝanĝo [Rito en 1-a de aprilo laŭ luna kalendaro]

Unu veston demetinte,
Enpakis en surdorsan sakon,
Mia vestoŝanĝa rito.

[Hitotu nuide usiro ni oinu koromogae]

El Yosino elirinte,
Mi volas palton forvendi,
Jam tago de vestoŝanĝo.

[Yosino idete nunoto uritasi koromogae]

Mangiku

En la naskiĝtago de Budhao [8-a de aprilo] ni adorvizitadis tien kaj ĉi tien en Nara, tiam do vidis naskon de cervido. Tio estas tre impona ĝuste en la tago.

La naskiĝtagon de Budhao
Naskiĝis la cervido –
Kia koincido!

[Kanbutu no hi ni umare au kanoko kana]

Kiam alvenis Japanion la sankta bonzo Ganzin[688-763], la fondinto de la templo Syoudaizi [Templo invita el Tang-Ĉinio], li eltenadis danĝerojn pli ol sepdek fojoj sur la ŝipoj, tamen salta vetro enblovis en liaj okuloj kaj fine blindigis la okulojn. Adorante lian sakralan statuon, mi versis:

Per juna folio
Larmojn de viaj okoloj
Mi volus forviŝi.

[Wakaba site onme no sizuku nuguwabaya]

Ni disiĝis de malnovaj amikoj [hajkistoj el Iga, Ensui, Takutai kaj Baiken].

Kiel unu korno de vircervo
Forkiĝas en ramuroj,
Tempas disiĝi ankaŭ al ni.

[Sika no tuno mazu hitohusi no wakare kana]

En la urbo Oosaka ĉe iu homo [hajkisto Issyou]

Marĉa irido –
Pri ĝi babili ankaŭ
Unu el vojaĝaj ĝojoj.

[Kakitubata kataru mo tabi no hitotu kana]

Ĉe Marbordo Suma

Luno estas,
Sed kvazaŭ la estro malestus,
Somero en Suma.

[Tuki wa aredo rusu no you nari Suma no natu]

Mi spektas lunon,
Tamen mankas io,
Somero en Suma.

[Tuki mite mo mono tarawazu ya suma no natu]

Meze de kvara monato la ĉielo restas nebuleta, luno de fragila mallonga nokto ŝajnas tre ĉarma kaj montoj nigriĝas per junaj folioj. Sub aŭroro, kiam jam devas ekkanti kukoloj, ekde horizonto estas heliĝanta la maro kaj sur altebenaĵo, eble nomata Ueno, kune ruĝiĝas la ondoj de tritikaj spikoj, kaj ankaŭ videblas sporade papavofloroj apud

aleroj de fiŝistoj.

Vizaĝon de fiŝisto

Unue povas vidi,

La papavofloroj.

[Ama no kao mazu miraruru ya kesi no hana]

Ĉi tie estas dividitaj en tri vilaĝojn, t. e. Orienta Suma, Okcidenta Suma kaj Laŭborda Suma, kaj mi ne vidas, pri kio okupiĝas loĝantoj. Estas dirite en antikvaj poemoj, ke “kolektante algon por fari salton, mi sopiras ĉe la bordo de Suma”[Ariwara no Yukihira], tamen nun oni, ŝajne, ne faras tiun laboron. Oni kaptas per reto fiŝojn, nomatajn silagoj, kaj sekigas ilin sur la sablo, tiam korvoj alflugas kaj forportas ilin. Tion riproĉante, oni per pafarko minacas. Ĉu devus tiel fari fiŝistoj? Eble, ili tion faras tial, ke ĉi tie ankoraŭ restas postsigno de la malnova milito, kies kulpo ŝajnas tre profunda. Mi volas supreniri al la montpinto Tetukai ga Mine, sopirante je pasinteco. Gvidanta knabo malvolas kaj rifuzadas iel, sed mi kaĵolis lin diversmaniere, dirante, “Mi regalos cin per frandaĵo en la teejo ĉe la montpiedo”. Fine li konsentis, verŝajne, malgraŭvole. Antaŭa vilaĝa knabo, kiu gvidis taĉmenton de Yositone, havis dek ok jaraĝon, do mia gvidanto estas pli juna ol li je kvar jaroj. Sed dank’ al mia knabo, kiel gvidanto de deklivo je kelk-cent da metroj, mi suprenrampis sinuan kaj krutan rokpadon, apenaŭ glitadis malsupren multfoje, tamen prenante je rododendroj, je etabambuoj, anhelante, ŝvitante, finfine atingis montpinton por stari ĉe eniro al nuba pordo. Pro ĉio mi dankas al penado de eta gvidanto.

Fiŝisto de Suma

pafarkis. Ĉu antaŭ la sago

Krias kukolo?

[Suma no ama no yasaki ni naku ka hototogisu]

En la sama direkto,

Kien forflugas kukolo,

Troviĝas unu insulo.

[Hototogisu kie yuku kata ya sima hitotu]

Ĉe la templo Suma

Sub nigra ombro de arbo

Aŭdeblas fluteto, kiun ludas neniu.

[Sumadera ya hukanu hue kiku kosita yami]

Tranokto en Akasi

Polpokapta vazo,

kie songo efemera,

Sub la somera luno

[Tako tubo ya hakanaki yume o natu no tuki]

En la romano “Genzi-monogatari” estas dirite, “pli impona estas ĉi-tiea aŭtuno”. Vera beleco de ĉi marbordo troviĝas ĉefe en aŭtuno. Tristeco kaj soleco estas nedirebla, kaj se nun aŭtune, eĉ mi povus iomete versi pecon da koro, sed, je tiu penso mi tro alte taksas mian kreaŭ kapablon, ne sciante min mem mallerta.

Klare videblas la insulo Awazi, dividanta maron en du partoj, dekstre Akasi kaj maldekstre Suma. Mi imagas, ke la ĉina pejzaĝo de du landoj, dividitaj oriente kaj sude, Wu kaj Chu, kiel verkis Du Fu, eble, similas al ĉi-tiea. Se multesciulo, vidante ĉi pejzaĝon, li povus prezenti al si diversajn pitoreskajn lokojn, komparante kun ĝi.

Kaj malantaŭe trans unu monto estas la loko, nomata Tainohata, kie estis, onidire, hejmo de fratinoj Matukaze kaj Murasame, amitaj de la ekzilita poeto Ariwara no Yukihiro. Laŭ monteĝo estas la pado al la provinco Tanba. Ĉe la monto Tetukai ga Mine restas teruraj toponimioj tiaj, kiel “Enrigardo de la monto Hatibuse” aŭ “Rekta faligo”, kaj kiam el la pino, nomata “Gongpendigo” [ĉar Yositone pendigis gongon je la pino], mi suben rigardas, tiam sub la okuloj videblas la ruino de imperiestra palaco en la valo Itinotani. Kvazaŭ kaoso en tiu epoko kaj tiama tumulto prezentiĝus al mi en koro, antaŭ miaj okuloj kolektiĝus tiaj diversaj vizioj, kiel haste azilas en la reĝan ŝipon kaj la bonzino de dua ranga, edzino de Kiyomori, portanta sur siaj brakoj la junan mikadeton, kaj s-ino Tokuko, dua filino de Kiyomori, kun siaj piedoj implikiĝantaj per trenaĵo, kaj kiel diversrangaj korteganinoj kaj servistinoj enĵetas en ŝipon diversajn kuirilojn kaj muzikilojn (liutojn, kotojn ktp.) kovritajn per hutonoj aŭ peplomoj. Ŝutiĝintaj reĝaj manĝaĵoj fariĝas nutraĵoj por fiŝoj, kaj malordiĝintaj galanterioj – ruboj por fiŝistoj. Miljara tristeco restas sur ĉi marbordo, eĉ sono de ondoj plenas de spleno.